A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

**N-ro 2/2015 (255)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*Kelkaj el partoprenantoj de la 41-a Printempa Seminario en Skokovy dum ekskurso al Kacanovy*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznan.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto: Vladimír Dvořák,** Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumbazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

**Revizia komisiono de ĈEA:**

*Prezidanto*: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, P. Polnický, V. Türk

# KUN ESPERANTO ĈIRKAŬ LA MONDO!
## 26.-27.9.2015 en Svitavy



Sabate ĉ. la 8-a kaj 10-a horoj alveturo de rapidtrajnoj el direktoj Brno(-Vieno) kaj Česká Třebová (-Prago-Olomouc-Ostrava).

ATENTON:
**Je 9:00** Inaŭguro de la ĈEA-KONGRESO (en Esperanto-Muzeo) (laŭ la nova Civitana Leĝaro devas ĉeesti pli ol duono de la tuta membraro, niakaze ĉ.280, kio tute ne realas);
baza programo aperos en la ĈEA-retejo
Kaze de la nuligo de la kongreso pro nesufiĉa partopreno estos anoncita anstataŭa kongreso (vidu kaj aliĝu sekvapaĝe - 6.-8.11. en Ústí nad Orlicí) kaj validas sube menciita programo! - Vidu klarigon en Starto 2015/1/8.

**10:30-12:00 – Inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio** ***„Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo"***



(aŭ *Netradiciaj vojoj al ekkonado de fremdaj landoj kaj kulturoj*) kun akompana programo - en la Esperanto-Muzeo

**12:15-13:30** Fakultative komuna tagmanĝo kaj babilado en la restoracio ASTRA (ebleco elekti el favorprezaj pretaj pladoj, pagoj individue surloke)
- interesitoj pri rezervado de la sidloko en la saloneto bv. aliĝi **ĝis 23.9.**, poste sengarantie!

**13:30-14:45** Partopreno en la Sanktvenceslaa vingustumado sur la ĉefa placo, prezentiĝo de zimbalona muzikensemblo

**15:00-17.30-(18:00)**
**Vojaĝprelegoj kaj diskutoj kun projekciado** ĉ. 18:00 foriro de trajnoj por tiuj, kiu ne restos ĝis dimanĉo

**18:00-19:30** Paŭzo por libera vespermanĝo, Esperanto-Muzeo disponeblas por libera babilado

**ekde 19:30** Vespera programo - vojaĝtema filmprojekciado, "Muziko el ĉiuj partoj de la mondo" (komuna muzikumado), laŭinterese rilaksa ateliero kun mandaloj

**PARTOPRENO EN LA TUTA PROGRAMO SENPAGAS!!**

Dimanĉe 27.9. antaŭtagmeze
a) **9:00-11:30** - vojaĝprojekciado, diskuto kun eksterlandaj gastoj, event. lingva konversacio aŭ primovada diskutforumo en la Esperanto-Muzeo
b) precipe por gastoj de malproksime – duontaga ekskurso al Litomyšl (per linia buso) aŭ Polička (per trajno), aŭ peraŭte (se disponeblos) – tempo de la reveno kongruas kun foriro de la tagmezaj trajnoj; elspezojn por vojaĝo kaj enirbiletoj pagos ĉiuj individue surloke

**ĉ. 12:00** - forveturo de trajnoj en direktoj Brno (- Bratislava, Vieno) kaj Česká Třebová (- Prago, Ostrava)
Por tiuj, kiuj restos ankoraŭ posttagmeze:

**15:00** la lasta tago de la ekspozicio pri historio de aviado en la Urba Muzeo kaj Galerio kaj prelego de Pavel Fencl "Mi flugis en Malhelblua mondo" (ĉeĥlinve)

**EBLECO DE TRANOKTO:**
Por 1 aŭ pli da noktoj en nove rekonstruita apartamenta pensiono "Bárta" sur la ĉefplaco en la senpera najbareco de Esperanto-Muzeo (350,- popersone/nokte, sen matenmanĝo). Disponeblas plene ekipita kuirejo. Retejo kaj fotogalerio:
http://www.ubytovanisvitavy.eu/.
**Aliĝu plej malfrue ĝis la 25-a de aŭgusto** (poste sen garantio!!).

**KONTAKTO** - Informoj kaj aliĝoj:
svitavy@esperanto.cz,
Muzeum esperanta,
nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy
tel. (+420) 604 377 616

# ATENTU!

Ĝis la **15-a de septembro** vi havas ankoraŭ la okazon viziti la nunan teman ekspozicion **"ESPERANTO KAJ KOLEKTADO"** kun ekspoziciaĵoj el 40 landoj de la mondo! Malfermohoroj estas marde ĝis sabate 9-12 kaj 13-17h. Se vi deziras renkontiĝi kun membroj de la loka Klubo de amikoj de Esperanto, nepre antaŭe anoncu vin!

**KONTRIBUANTOJ POR NOVA EKSPOZICIO SERĈATAS!**
Se vi disponas pri interesaj fotaĵoj (eĉ retformaj), dokumentoj, kolektmaterialoj, aŭdvidaj dosieroj ktp. vojaĝtemaj, bv. kontakti pavla.dvorakova@esperanto.cz.
Antaŭdankon!

ĈEA-komitato elkore invitas vin al

**Kultura Konferenco**

# (event. Anstataŭa Kongreso) de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

## 6.-8.11.2015
## en Ústí nad Orlicí

Ústí nad Orlicí estas distrikta urbo kun pli ol 14 mil loĝantoj, situanta ĉ. 10km okcidente de Česká Třebová, ĉe la riveretoj Třebovka kaj Tichá Orlice. Ĝia senduba avantaĝo estas perfekta trafika atingebleco kaj proksimume centra situo sur la ĉefa trajnlinio Praha-Ostrava.




*maldekstre: ĉefplaco kun urbodomo, fonto:Wikimedia Commons, Fojsinek*
*dekstre: Urba Muzeo, fonto: Wikimedia Commons, Petr 1888*

Dum la sabata urbopromeno estos al vi prezentitaj ĉefaj vidindaĵoj de la urbocentro: precipe ĉefplaco kun malnova urbodomo kaj historiaj domoj, preĝejo de Ĉielenpreno de Virgulino Maria kun dekanejo, renesanca preĝejo de bohemaj fratoj kaj nelastvice pompa secesia vilao de Hernych, sidejo de la Urba Muzeo, kiun ni kune vizitos.

Ni kunvenos en **studenthejmo de la artmetia mezlernejo** (SŠ uměleckoprůmyslová, Zahradní 541). Loĝado estas certigita en 2-litaj ĉambroj (kun duŝejo/necesejo komuna por du ĉambroj.) En la areo troviĝas ankaŭ manĝejo (uzebla ankaŭ por la programo) kaj klubejo por nia dispono.





**<u>Supozata programo:</u>**

Labortraktado, diskutoj, muzikaj kaj literaturaj prezentoj, filmprojekciado, komuna muzikumado, urbotrarigardo kun vizito de la Urba Muzeo, sabata dancvespero.

Proponoj pri viaj eblaj kontribuoj bonvenas!

Kaze ke la septembra ĈEA-kongreso en Svitavy estos finita pro nesufiĉa partopreno (vidu antaŭan paĝon pri "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" kaj klarigon en Starto 2015/1/8), kio probablas je 99,9%, tiu ĉi konferenco estos proklamita kiel rezerva (anstataŭa) kongreso kaj la antaŭtagmezaj programoj estos dediĉitaj al ĈEA-labortraktado inkl. precipe necesan alprenon de la nova statuto. Dankon por via komprenemo.

Aliĝilon kun kompletaj informoj pri prezoj vi trovos sekvapaĝe.

Ni antaŭĝojas sincere vian partoprenon!

*Estimplene membroj de ĈEA-komitato*

# Renkontiĝo en Šumperk



Sabate la 16-an de majo 2015 Esperanto-klubo en Šumperk aranĝis renkontiĝon. Ĉi-foje ĝi invitis nin viziti Muzeon de Ŝoseoj en Vikýřovice, kiu estas daŭrigo de la urbo Šumperk.



En la muzeo troviĝas daŭra ekspozicio *Laŭ spuroj de fratoj Klein*. La fratoj direktis sian entreprenadon ĉefe al konstruado de fervojoj inkluzive de pontoj kaj tuneloj. Tiucele ili praktikis nialande ankaŭ ferfabrikojn, kie ili produktis partojn de pontoj kaj ankaŭ teknologiaĵojn por minejoj, altfornoj kaj maŝinfabrikoj. Apud ekspozicio dediĉita al fratoj Klein estas en la muzeo ekspozicio pri historio de pontoj, pri konstruado de ŝoseoj, de ŝoseaj kaj landlimaj ŝtonoj. Sed la plej interesa estis ekspozicio de tricikloj pruntita de Jiří Fiala, kiu posedas jam 130 eksponaĵojn de la komenco de tricikloj ĝis nun. Sinjoro Fiala konsideras plej valora triciklon el Anglio de la jaro 1892.



La posttagmeza programo estis en restoracio en iama kinejo Svět (Mondo). Surprizo de la programo estis koncerto, ĉe kiu Jiří Sedláček ludis sur klarneto kaj Rudolf Rotr sur gitaro. Por 32 partoprenantoj el 12 lokoj de la respubliko la lokaj klubaninoj preparis manĝetojn. Ankaŭ poezio ne mankis. Denove estis multaj informoj el rondetoj kaj invitoj al renkontiĝoj, kiuj nin ĉi-jare ankoraŭ atendas.

*Libuše Dvořáková, Svitavy*
*fotoj Karel Vala*



# Renkontiĝo en Svitavy kaj Moravská Třebová

Sabate la 25-an de aprilo 2015 Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy organizis regionan renkontiĝon. Por fieri pri la belaĵoj de la ĉirkaŭaĵo la klubo komencis la programon en Moravská Třebová, urbo kun multaj historiaj memorindaĵoj kaj riĉa historio. Tie troviĝas bela renesanca kastelo, muzeo de Ludvík Holzmeister kun *Ekspozicio de egipta princino aŭ Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo*, bele ornamitaj urbaj domoj kun internaj volboj kaj pentraĵoj.



La kastelo estas parto de urba monumento-rezervejo Moravská Třebová. Super la kastelo troviĝas Kruca monteto (Křížový vrch) kun barokaj kapeloj kaj statuaro de Kalvario. Unu el la plej gravaj personoj en la historio de la kastelo kaj de la urbo estis Ladislav Černohorský el Boskovice, kiu alikonstruigis la originan burgon el la 13-a jarcento al renesanca kastelo. La evoluon de la kastelo kulminigis Ladislav Velen, kiu en sia bienlando en Moravská Třebová koncentris vicon da scienculoj, artistoj, ŝtonskulptistoj kaj alkemiistoj (ekz. M. E. Bonacina), subtenis la eldonan agadon de Unueco de fratoj, financis vicon da kulturaj aktivadoj kaj estis konata de J. A. Komenio, kiu dediĉis al li sian gloran mapon de Moravio. Ĉio ĉi kontribuis al tio, ke Moravská Třebová estis nomata Moravia Ateno.

Sume 20 partoprenantoj el 9 lokoj de la respubliko transiris el Moravská Třebová al Esperanto-muzeo en Svitavy, kie okazis la posttagmeza programo. Kvido Janík projekciis filmon pri vojaĝo tra Irano. Li klarigis kutimojn kaj regulojn de la societa konduto en tiu lando. La realaĵo de la vivo estas alia, ol kion ni eksciis el amaskomunikiloj. Sekvis tombolo kaj invito al sekva renkonto.

*Libuše Dvořáková*

# Renkontiĝo de „Lančovanoj"

14.8.-16.8.2015

Post la fino de la 3-a ĉi-jara etapo de SET-Lančov denove renkontiĝos la iamaj tendaranoj kiel ĉiujare. Bonvenaj estas ankaŭ tiuj, kiuj neniam estis en Lančov, sed volas konatiĝi kun loko, kie dum duonjarcento estis edukataj kelkcent esperantistoj, kvankam nun ili estas tie minoritato pro ekonomiaj kialoj.
Aliĝi eblas ankaŭ al la dua kaj tria etapoj, ankoraŭ estas loko.

*http://set-lancov.cz* Foto 2014 de V. Rataj



# Polaj infanoj revenas al ni kun plezuro

En la tagoj 12 – 15 junio 2015 etaj esperantistoj el la pola urbo Rybnik vizitis ĉeĥajn urbojn Česká Třebová kaj Litomyšl.



Zorgis pri ili membroj de la klubo Amikeco Česká Třebová. Sabate ili renkontis ankaŭ esperantistinojn el Svitavy, kiuj jam multajn jarojn kunlaboras kun la pola sinjorino instruistino Tereza. Ĉi-jare niaj gastoj sopiris ekkoni la urbon Litomyšl.



La dato de la vizito estis elektita tre bonŝance. Jarfine 2014 la urbo finis rekonstruadon de la kastela monteto, de la Urba Muzeo, de la Piarista preĝejo, kie inter du turoj estiĝis belvidejo kun bela panoramo de la urbo, plue rekonstruadon de la kastelaj bierfarejo kaj rajdejo. Estas ĉi tie novaj eskpoziciaj galerioj, restoracioj, vendejoj de suveniroj.



En la tempo de nia vizito okazis la tradicia muzika festivalo *Litomyšl de Smetana*. En la kastela korto, alitempe malplena, estis lokitaj tegmentitaj spektejo kaj podio. En la restaŭrista universitato okazas promocioj. En la kastelo la infanoj vidis unu el la plej malnovaj nialandaj teatroj. En la Smetana-ĉambreto ili iom pianludis kaj per orelklapoj provis, kian impreson oni havas, se oni muzikas kaj nenion aŭdas – jen situacio, en kiu Bedřich Smetana estis en la lastaj jaroj de sia vivo. Je dispono estis piano ankaŭ en la trairejo al la kastela korto. Por la infanoj estis certigitaj aldonaj ludoj kiel kreado de ŝipoj per faldata papero, fiŝkaptado, ĵonglado kaj kvizo. Koncize, paradizo por infanoj. La infanoj ne forgesis aĉeti donacetojn por siaj proksimuloj. Eĉ la varmega vetero ne fuŝis ilian ĝojon.

*Libuše Dvořáková*

EK "La Ponto" Písek invitas vin al

## La 9-a POSTFERIA RENKONTIĜO

**sabate 5.9.2015 en Netolice**

Trafikkonekto:
buso el České Budějovice je 8:45
**PROGRAMO ekde 9:30 ĝis 16:00**
* **9:30** kultura kaj prelega programo en la Urba Muzeo (inkl. la migran Esp. ekspozicion)
* Komuna tagmanĝo kaj kantado kun gitaro
* Urbopromeno kaj trarigardo de la kastelo Kratochvíle kun Esperante parolantaj renesance kostumitaj ĉiĉeronoj



* Surprizo ne ekskludeblas!

Por dezirantoj eblas mendi tranokton por 1 aŭ 2 noktoj (en turisma tranoktejo aŭ ĉefiŝlaga aŭtokampadejo Podroužek, ev. en la hotelo Rychta).
Bv. informiĝi plej malfrue ĝis la 10-a de aŭgusto!
Aranĝeblas bivakfajro kaj aldona ekskursa programo dimanĉe.
**Vendrede 4.9. ekde 17:00**
inaŭguro de la migra ekspozicio kun diskuto kaj kultura programo.

**Info kaj aliĝoj:**
Vladimír Türk, Tržní 541, 386 11 Netolice, netolice@esperanto.cz
tel. 607257223

**Silezia Esperanto-Asocio**
**invitas vin al**

## 48-a Internacia Esperantista Feriado

**2.-9.9. 2015**
**en banloko Duszniki Zdrój, Pollando (ĉe la landlimo kun Ĉeĥio, proksime al Náchod)**

**Vizitu iaman Bad Reinerz, kie kuracis sin en 1909 d-ro Zamenhof!**

Tradicia aranĝo kun familieca etoso kaj riĉa programo, pri kiu ni favore skribis jam lastjare. Antaŭtagmeze lingvoinstruado, posttagmeze ekskursoj al bela ĉirkaŭaĵo, vespere kulturaj kaj amuzaj programeroj.

**Loĝado en Hotelo de Esperanto aŭ pli favorpreze en apuda hoteleto Sudety.**

**RETEJO:**
http://eo.wroclaw.pl/sea/arangoj/duszniki/
**KONTAKTO:**
pomer@wp.pl

# 100-a UK

Lillo, 25 julio – 1 aŭgusto 2015

La jubilea kongreso havos temon **Lingvoj, artoj kaj valoroj en dialogo inter kulturoj**. Jam aliĝis preskaŭ 2400 personoj el 81 landoj, inter ili kvindek el Ĉeĥio kaj dudek kvin el Slovakio. Por niaj slovakaj samideanoj ĝi estas preskaŭ deviga, ĉar post unu jaro okazos UK en Nitra, ili do devas transpreni la flagon kaj kolekti ankaŭ organizajn spertojn.

## SEULO GASTIGOS LA 102-AN UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj.

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare; el 52 al 112.




La 88-a SAT-kongreso gastos en la slovaka urbo Nitra, kie en 2016 okazos la 101-a UK. Informoj http://sat.ikso.net/



*La SAT-kongresejo en la universitata student-hejmo „Bernolák“.*

Nitra estas bela kaj historia urbo, situanta nur 90 km de Bratislavo. En Nitra jam tri-foje okazis Somera Esperanto-Semajno (SES).

La programo konsistos el kelkaj partoj:


**Antaŭtagmeze kaj posttagmeze:** ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj, ktp.

**Vespere:** Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko…

**Ekskursoj:** Urbo kaj kastelo Nitra, Banská Štiavnica, Bratislava, Topolčianky

# RENKONTIĜO EN PACOV (28.4.2015)

La regionan renkontiĝon okaze de inaŭguro de la migra ekspozicio *Ĉu Esperanto estas morta lingvo?* en areo de la Urba Muzeo partoprenis esperantistoj el Pacov, Pelhřimov, Tábor, Písek, Benešov, Praha kaj Mladá Boleslav.



*Juna urbestro de Pacov Lukáš Vlček dum kantado de "Talina fiŝlago" – sekve esprimis sin, ke pri Esperanto kaj ĝiaj eblecoj li estis vere agrable surprizita*



*Malgraŭ pluveta vetero la alvenintoj konatiĝis esperantlingve kun urbaj belaĵoj kaj kun la muzeo*



*Milada Zemanová kaj Danuše Zíková deklamas poemon de A. Sova*

Oferema loka organizantino Milada Zemanová sukcesis venigi al la inaŭguro i.a. mem la urbestron kaj direktoron de la muzeo kaj tutan gimnazian klason. Dum la programo eksonis i.a. vortoj de d-ro Max Kašparů pri senco de Esperanto legataj de d-ro Rytíř, poemoj de la plej fama pacovano Antonín Sova *(La regiono de Tábor* kaj en monda premiero – tiutage spontanee verkita – ankaŭ muzikigo de la poemo *Pastoralo* en prezento de Pavla Dvořáková (aŭskultebla en http://www.ipernity.com/doc/181031/37950916).

Ĉiuj vizitantoj povis fine mem gustumi belsonecon de Esperanto dum la komuna kantado.

Estis ĝojige konstati, ke en la urbo mem ankoraŭ vivas ekslernant(in)oj de s-ano Prachař, aŭtoro de la lerno-libro *Esperanto pro děti,* kiu vivis en Pacov kaj en la 1970-aj jaroj gvidis tie kursojn. Volonte rememoris lin ekz. laborantinoj de la Urba Biblioteko, kien ni venis donaci inform-broŝuron, same kiel posedantino de la picejo, kie okazis la tagmanĝo. Nun li vivas en Hlinsko.

Gimnazianojn dum la ekspozicio ekinteresis la fakto, ke ekzistas Esp. tradukoj de kantoj de J. Nohavica kaj petis la instruistinon eltrovi ilin kaj provi kune kanti. Eble ne restos nur ĉe kantado kaj iuj eĉ provos eklerni la lingvon ....

*-padv-*

# Trovitaj fotoj




Sinjoro Miroslav Stehlík el Kanado sendis al ni foton de E-grupo Brno-Židenice 1947, sur kiu troviĝas fama latva poetino **Milda Jakubcová** (1899-1979), fraŭline Milda Pirsts el Riga, kiu en decembro 1932 edziniĝis al sia korespondanto en Brno František Jakubec. Sur la bildo ŝi sidas en latva vesto super knabeto (s-ro Stehlík mem, tiam 5-jara). Apud ŝi maldekstre sidas blinda geedza paro kaj post ili staras kiel unua de maldekstre s-ro Rajmund Stehlík, la patro de M. Stehlík, malantaŭe estas videbla barbohava vizaĝo kun okulvitroj de s-ro Šereda, sekretario de la grupo (M. Jakubcová estis prezidanto kaj kurs-gvidanto).

M. Jakubcová famas pro siaj versoj pri bestoj (*Estrado de animaloj*) kaj pro artikoloj, kiuj aperadis en multaj gazetoj tra la mondo, precipe en Esperantisto Slovaka. Ŝi ankaŭ esperantisgis el latva poezio. *-mm-*



Alian interesan foton ni ricevis el biblioteko de Černovice apud Tábor. Bibliotekistino Václava Šenoltová fotis sinjorinon **Jana Cíchová-Hrdličková** (1923-2014), honoran membrinon de ČEA, kiu estis ofta vizitantino de la biblioteko. La foton sendis verkisto Jiří Turek kun informo, ke s-ino Cíchová estis tre respektata civitano de la urbeto, ke ankaŭ ŝia patrino havis meriton pri la kolekto de artikoloj pri la historio de la civito. *-mm-*

## Jaroslav Svojše – esperantisto

Konata skolta verkisto de ĉeĥlingvaj libroj *Jestřábí kaňon, Jezero sedmi světel, Strážci Zlaté řeky* (*Akcipitra kanjono, Lago de sep lumoj, Gardantoj de Ora rivero*) Jaroslav Svojše (1920-1983) fine de sia vivo eklernis Esperanton, kontribuis al la gazeto *El skolta mondo* per rakontoj sub pseŭdonomo King-Kay, laŭdire li eĉ esperantigis libron de Miroslav Horníček *Dobře utajené housle (Bone sekretigita violono)*. *-mm-*

# El la mondo

■ Ĉe la populara lingvolerna retejo **Duolingo** aperis kurso de Esperanto por anglalingvanoj preparita de Chuck Smith. En unu semajno aliĝis preskaŭ 20 mil personoj. Oni supozas versiojn ankaŭ por aliaj lingvoj. Vizitu ĉe:
http://incubator.duolingo.com/#courses/eo/en/status

*Laŭ Libera Folio*

■ **Urbestra kandidatino** en Barcelono uzis afiŝojn en pluraj lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto kun surskriboj: *Plej danĝere estas resti hejme, Ni estas 99% kontraŭ 1%, La demokratia revolucio apartenas al ĉiuj*. Vidu ĉe Libera Folio:
http://www.liberafolio.org/

■ **Konto ESPERO** de UEA disponeblas por helpo al **Nepalo**. Kiu volas donaci monon tiucele, bonvolu utiligi la donacpaĝon en la retejo de UEA:
http://uea.org/alighoj/donacoj
En la sekcio por "notoj, komentoj" ĉe la fino, bonvolu indiki "por Nepalo".

■ En 2014 havis UEA **5027 individuajn membrojn**, plej multajn en Germanio (462), Brazilo (454), Francio (429), Japanio (326), Usono (269) kaj Nederlando (206).

■ **Plej furoraj libroj** ĉe Libroservo de UEA estas lingvoekzercilo *Poŝamiko*, *Fundamenta Krestomatio*, *Vojaĝo en Esperanto-lando*, *Homoj de Putin* kaj *Asteriks kaj Kleopatro*.

■ **Arbaro ne estas rubejo**. Papero forĵetita en arbaro dissolviĝos post 4 monatoj, ŝtofo aŭ oranĝo post 1 jaro, cigaredo aŭ ladskatolo post 15 jaroj, plastoj aŭ maĉgumo post 100 jaroj, vindotuko post 250 jaroj kaj vitro eĉ post 1000 jaroj.

■ **Esperantisto Jan Řepa-filo**, nomata Miki, kvardekajara, partoprenis maratonan kuron kaj atingis rezulton 3 horoj 54 minutoj.

■ **Alie mi estas drogisto Vaněk el Kralupy**. Kralupanoj kolektis 58 tradukojn de la frazo *Já jsem takto drogista Vaněk z Kralup* el Švejk. Inter ili estas la esperantlingva el traduko de Vladimír Váňa (p. 381). Ĉefserĝento Vaněk klarigas, kio li estas en civila vivo.

■ **La 67-a kongreso de Bulgara** Esperanto-Asocio okazis aprile en Ruse. Eksterlandanoj estis surprizitaj, ke tie ili preskaŭ ne aŭdis Esperanton, eĉ aktoroj aktoris bulgare, ŝanĝita programo estis presita bulgare, tial la gastoj maltrafis, kion ili volis vidi.

*Laŭ Marian Vochin, Rumanio*

■ **Interlingvo inter lingvoj** estas dua kolekto de premiitaj eseoj en Belartaj Kokursoj de UEA. Enhavas ankaŭ verkojn de ĉeĥaj aŭtoroj (Marie Bartovská, Jan Werner). Prezo 15 eŭroj. Aĉetebla estas ankaŭ la unua kolekto **Pri homoj kaj verkoj**, prezo 9 eŭroj.

■ **Internacia Kongresa Universitato** en Lilo estos gvidata de d-ro Jesper Lykke Bannier-Jacobsen, dandevena fizikisto en Parizo, kiu kunlaboris pri PIV rilate fizikon. Ĉi-jare estas preparitaj dek prelegoj, resumoj estas legeblaj ĉe
http://www.uea.org/teko/IKU/2015

■ **UEA havas 5050 individuajn membrojn**, ĉar membriĝis 775 novaj, kiuj volis partoprenis UK en Lilo.

# Bartošovice en Ĉinio

En la pasinta numero sur la paĝo 7 ni informis pri rezultoj de konkurso de Ĉina Radio Internacia (organizita kunlabore kun UEA kaj Forstkultura Universitato en Hangzhou) pri mallongaj filmoj je la temo *Teo kaj amo*. La internacian festivalon partoprenis entute 45 filmoj el 20 landoj de 4 kontinentoj (i.a.ankaŭ filmo de E-klubo el Svitavy). Ĉiuj estis aŭ origine paroligitaj aŭ almenaŭ subtekstigitaj en Esperanto.



"茶与爱情"微电影大赛

荣誉证书

Honora Atestilo

De la Konkurso de Mallongaj Filmoj "Teo kaj Amo"

先生/女士(Sinjoro/Sinjorino): Pavol Kaščák, Rostislav Čubok kaj Baza Lernejo Bartošovice

您在国际世界语协会，中国国际广播电台、浙江农林大学、杭州中国茶都品牌促进会共同举办的中国国际微电影盛典（2014—2015）茶都杯"茶与爱情"微电影大赛中荣获 三 等奖。

特发此证，兹以证明。

En la konkurso de mallongaj filmoj "Teo kaj Amo" (2014-2015), kune organizita de Universala Esperanto-Asocio, Ĉina Radio Internacia, Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato kaj Hangzhou-a Asocio por Popularigi Te-Markon, vi gajnis la 3-an premion.

国际世界语协会 Universala Esperanto-Asocio — 2015 年 4 月
中国国际广播电台 Ĉina Radio Internacia — 2015 年 4 月
浙江农林大学 Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato — 2015 年 4 月
杭州中国茶都品牌促进会 Hangzhou-a Asocio por Popularigi Te-Markon — 2015 年 4 月

评委签署(Subskribo de la jurio):

La unuan premion ricevis egale dek filmetoj, kies aŭtoroj estis invititaj al Ĉinio por komuna programo. Inter ili ankaŭ Pavol Kaščák, redaktoro de Verda Stacio, kaj Rostislav Čubok, kiuj ricevis diplomon pro sia filmo **Rememoro** filmita en la kastelo Bartošovice, kie estas organizata Internacia Esperanto-Lernejo.




Esperanto kaj filmoj estis sukcese prezentitaj al la neesperanta publiko kadre de granda festivalo pri teo, kiu ĝuste en aprilo en la urbo Hangzhou okazis. En la ĉeĥa stando estis prezentita ĉeĥa kulturo en Esperanto, ekz. nova libro pri Otokar Březina.



*Sur la tablo ni vidas flagojn ĉinan kaj ĉeĥan, Starton, figureton en folklora vesto.*



*Pavol Kaščák prezentiĝis kadre de la internacia vespero kun la konata pola popolkanto "Montarano" (Guralu)*

La aranĝon partoprenis ankaŭ UEA-prezidanto Mark Fettes kaj aliaj movadaj gravuloj. Pri la sukceso infomis ankaŭ televido Polar Ostrava (en intervjuo 20.5.2015).
Vi povas spekti ĝin en ĉeĥlingvaj Aktualaĵoj en www.esperanto.cz.

# Printempa Seminario en Skokovy

**en Ĉeĥa paradizo okazis jam kvardekunuan fojon – triafoje kune kun la interreta seminario Sabla Printempo - de la 20-a aprilo ĝis la 26-a de aprilo 2015.**

Belan sunan veteron ĝuis entute 29 homoj, kiuj venadis aŭ foriradis laŭ siaj ebloj kaj interesoj. Ĉar inter ni estis Jadwiga Zakrzewaka el Pollando, ni penis konstante uzi „nian lingvon“ kaj ne krokodili. Aperis por paroligi sin du novulinoj.

Prelegojn preparis Jindřiška Drahotová, Viktor Dvořák, Miroslav Smyčka, Pavla Dvořáková. Petro Chrdle parolis pri siaj travivaĵoj en orientaj landoj. Ni multe kantis kaj Pavla kun Jarka Malá registris kantojn kaj voĉajn prezentadojn. En urbodomo en Mnichovo Hradiště akceptis kvar el ni Ondřej Lochman – urbestro, flue parolanta la polan lingvon. La renkontiĝo estis tre agrabla.



*dumekskurse en la rokaj ĉambretoj apud la burgo Kost*

Ni vizitis ankaŭ statuon de Václav Budovec, pri kies vojaĝo al oriento ni aŭdis dum prelego je la pasinta vespero. La ekskurso direktis al „Kopicův statek“ en rokan valon kun malnovaj reliefoj. Alian ekskurson ni aranĝis piede tra herbejoj al vilaĝo Žďár, kie en pitoreska domo vivas artistino pri ceramiko – sinjorino Baladránová. Ĉiun tagon antaŭ vespermanĝo ni kreadis suvenirojn, tre diversajn sub gvido de Eva Pánková.

Pri la detala priskribo de la seminario vi povas trovi sur ŝiaj paĝoj: www.evinatelier.cz

La pensiono surprizis nin per nova meblo en manĝejo kaj nova maniero de matenmanĝo (t.n. svedaj tabloj).



*Pensiono ESPERO en Skokovy,*
*estrata de filo de d-ro Josef Hradil*
*http://home.tiscali.cz/penzionespero/esperanto/espindex.htm*

La venonta seminario okazos de 19.-25.10.2015. Prezoj: tranokto+plena pensio ĉ. 420 CZK/tage + programkontribuo č. 100-200 CZK.
Eblas ev. veni ankaŭ por 3-4 tagoj.
Aliĝoj: drahotova@esperanto.cz
tel. (+420) 326 731 845

*J. Drahotová*

# Přihláška na Kulturní konferenci, popř. na náhradní sjezd ČES (Ústí nad Orlicí 6.-8.11.2015)

Přihlášku vyplňte a zašlete emailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese www.esperanto.cz/aligxilo2015

**Doporučení:** Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

**jméno a příjmení** příp. včetně titulů (tak bude na jmenovce účastníka sjezdu)

adresa:

ulice

PSČ a místo

e-mail telefon

číslo občanského průkazu / pasu (povinný údaj jen pro ubytované)

**Označení u čtverečků křížkem (nastavíte mezerníkem) znamená výběr.**
**Zakroužkování (při ručním vyplňování) okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

| | |
|---|---|
| Souhlasím se zveřejněním jména a místa z adresy v seznamu účastníků. | ☐ |

**Přihlašuji se na akci Českého esperantského svazu v Ústí nad Orlicí, objednávám a zavazuji se uhradit následující. (**Přihláška je platná až po zaplacení.)

| | | |
|---|---|---|
| Základní účastnický poplatek | 250 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 30.9.2015** | 200 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 30.9.2015** | 150 Kč | ☐ |
| Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen výboru ČES, místní organizátor | 0 Kč | ☐ |
| číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření členství - nečlenové napište 5 číslic, **použijte jako variabilní symbol platby**) | | |
| Jako student do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci) | | ☐ |

Pozn: Na základě smlouvy s ČEJ a SKEF mají jejich členové právo na stejné poplatky jako členové ČES.

**Ubytování** - je zajištěno v Domově mládeže Střední školy uměleckoprůmyslové v Ústí nad Orlicí na ulici Zahradní, po dvou na pokoji a s WC a sprchou pro 2 pokoje. Je možné objednat si za výrazný příplatek 150 Kč/noc i ubytování samostatně na pokoji.

chci ubytovat s: (vepište jméno osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Nebude-li spolubydlící uveden, rozdělíme přihlášené do pokojů dle pohlaví a věku!

| | |
|---|---|
| Můj věk je | let |
| Spím výrazně hlasitě | ☐ |
| Jsem vegetarián (volba jídla pro stravující se) | ☐ |

Objednávám **zvýhodněný kompletní balíček**:

| | | |
|---|---|---|
| 2 noclehy v 2-lůžkovém pokoji (dle „chci ubytovat s:“ výše) a stravování od páteční večeře do nedělního oběda | 760 Kč | ☐ |
| 2 noclehy samostatně na pokoji a stravování od páteční večeře do nedělního oběda | 1060 Kč | ☐ |
| 2 noclehy a stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 300 Kč | ☐ |

Objednávám **jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby**:
Pozn.: Nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček.

| | | |
|---|---|---|
| nocleh z pátku na 2 lůžkovém pokoji | 250 Kč | ☐ |
| nocleh ze soboty na 2 lůžkovém pokoji | 250 Kč | ☐ |
| nocleh ze soboty na 1 lůžkovém pokoji | 400 Kč | ☐ |
| nocleh z pátku na 1 lůžkovém pokoji | 400 Kč | ☐ |
| příplatek za ubytování pouze na 1 noc | 50 Kč | ☐ |
| večeře - pátek | 60 Kč | ☐ |
| snídaně - sobota | 45 Kč | ☐ |
| oběd - sobota | 70 Kč | ☐ |
| večeře - sobota | 60 Kč | ☐ |
| snídaně - neděle | 45 Kč | ☐ |
| oběd - neděle | 70 Kč | ☐ |

| | | |
|---|---|---|
| členský příspěvek ČES na rok 2016 | | Kč |
| případný dobrovolný příspěvek pro ČES | | Kč |
| příplatek za přihlášku po 25.10.2015 | 100 Kč | ☐ |
| za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!) | 100 Kč | ☐ |

Upřesnění při společné platbě:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Za mne platí | | částku viz Částka k úhradě celkem níže | | |
| Já platím za | | částku | | Kč |

## Částka k úhradě celkem

(kontrolu či přepočet provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí - jedině - na uvedenou emailovou adresu)

**Kč**

**Úhradu proveďte na účet ČES:**

Fio banka, číslo účtu **2800186228 / 2010**

Jako **variabilní symbol** uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste na vyhrazené místo pro číslo průkazu člena (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!

V případě odhlášení se se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 25.10.2015 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.

V ____________ dne ______.2015 ..................................................

podpis (pro přihlášky poštou)


# Kiel mi esperantigis la komedion pri morto

Sabate, la 18-an de januaro 2014, mi frumatene preparis min por veturado al belecoj de vintra naturo. Trinkante varman teon mi aŭskultis radion. Sinjorino Markéta Jetelová anoncis, ke en tiu tago vespere havos premieron komedio de Blanka Fišerová „Sepultado aŭ Morgaŭ oni sepultos ĉie“ (ĉeĥe: „Pohřbívání aneb Zítra se bude pohřbívat všude“) en Moravislovaka Teatro en Uherské Hradiště. Mi mem ne scias, kial mi trovis adreson de la aŭtorino kaj petis ŝian permeson esperantigi la tekston. Eble pro tio, ke esperanta literaturo bezonas novajn tekstojn, kiuj temas pri nuna tempo, nunaj problemoj de homoj. Laŭ mia opinio esperantistoj devas esti agemaj kaj montri vojon al aliaj homoj.




*Moravislovaka Teatro en Uherské Hradiště*

La tradukado ne estis facila, ĉar mi bone scias nek teatran medion nek specialajn vortojn. Tial mi multfoje demandis la aŭtorinon pri fakaj esprimoj el sfero, kiun mi, bestkuracisto, vizitadas nur kiel spektanto. Post du monatoj la teksto de la komedio estis esperantigita kaj post detala lingva kontrolo, kiun faris Jan Werner, estis eldonita sub la nomo „Ĉerkotuneo“ danke al Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno.



*Blanka Fišerová*

Dum tradukado de la komedio mi bone amuziĝis, sed iam ankaŭ preskaŭ ploris. Ne pro tio, ke larmoj apartenas al sepultadoj. Mi estis kortuŝita, ke juna moravia poetino Blanka Fišerová, konata pro siaj teatraj kaj poetaj aktivoj, bonege trafis situacion en kiu nun troviĝas kulturo. Ĉerko kun mortinto sur la scenejo – nekapabluloj anstataŭis taŭgajn aktorojn – frazoj de politikisto, kiu volas insideme kaj silente neniigi la teatron, ĥaoso, absurdaj situacioj – kaj subite la vero! Mesaĝo de la aŭtorino: nenio estas perdita, kiam la vero vivas inter ni.



*Oldřich Arnošt Fischer*



*Libro „Ĉerkoturneo“*

## KOMENIO - ZAMENHOF

# La Vojo al Harmonio

***Jaroslav Karhan (daŭrigo)***

En tutmondaj preĝejoj de **ĉiuj** religioj povus okazadi – krom iliaj kutimaj Diservoj, kiuj restus absolute netuŝitaj – ĉiusemajne la «universalaj meditadoj» por **ĉiuj** homoj, kun unueca, simpla programo: komence kaj fine la korojn malfermanta, spirita muziko, meze la vorta parto, laŭ la Zamenhofa «homaranismo» el la j. 1906, punkto 11:

«Prelegoj pri verkoj de la grandaj instruistoj de la homaro, pri la vivo, pri rilato de mia «mi» al la Universo kaj la eterneco eĉ filozofie-etikaj interparoloj. Edukado de junuloj kiel pacaj batalantoj por vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco. Evoluigado de amo por honesta laboro kaj abomeno al ĉiuj malbonaj malvirtoj.»

Tiuj ĉi «universalaj meditadoj» fariĝus spirita, plennatura terapio de la tuthomara socio, analoga la naturan kuracadon en la medicino, sen negativaj, flankaj konsekvencoj, kies resaneco – precipe ankaŭ en la preventa imunoterapio – komenciĝos. La «universalajn meditadojn» povus realigadi pastroj, alterne de plej diversaj religioj, konatigante tiamaniere ĉiujn homojn kun sendogmaj, universale validaj oraj, moralaj grajnoj, spertoj, instruoj de iliaj propraj religioj, cele helpi al **ĉiuj** homoj trovi sencon kaj celon de vivo eĉ disvolvante la elementan, homaranan kredon de koro, en konkretan programon, por solvado de akutaj mondproblemoj.

En lokoj, kie estos jam sufiĉe da esperantistoj, povus okazadi tiuj ĉi «universalaj meditadoj» rekte en Esperanto. Tie ilia efekto estos la plej impresa kaj efika: muziko, pensoj, neŭtrala lingvo kreus la duan, universalan, emociplenan triunuon – plenplenan de belegaj, multkolorajfloroj – plibonigonta vivon de ĉiu unuopulo.

Tiamaniere la «Kosma ekumeno» fariĝus grava tuthomara faktoro por kreado de firma, konstanta internacia fido, ebligonta definitive transformi ĉiujn detruilojn en konstruilojn kaj tutmonde krei principe novan, ĉiuflanke plensanan vivmedion kun konstanta, justa ordo, en kiu estos feliĉa hejmo por ĉiuj.

Ĉiuj homoj havos hejmon ne nur materian, sed ni ĉiuj retrovos eĉ la hejmon spiritan, ĉe nia komuna Patro de l' Universo, kiun – laŭ esprimo de Zamenhof – «ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro sentas».

Ni revenos al Li, kiel malŝparemaj filoj, kiuj – ekde j. 3600 antaŭ Kristo ĝis nun – murdigis pli ol 3 miliardojn da siaj gefratoj, en pli ol 14 miloj da militoj, dum kiuj ni senrespondece malŝparis nekalkuleblajn kvantojn da valoraj krudaĵoj, mankontaj al niaj posteuloj, grave difektis nian vivmedion eĉ faris multajn pluajn malbonaĵojn.

Spirite maturiĝintaj kaj per tiuj ĉi teruraj spertoj pli saĝaj, ni komprenos kaŭzon de kaŭzoj de la pasintaj eraroj kaj kuraĝiĝos komplekse realigi la trian, konkludan triunuon: la ĝeneralan pardoniĝon, kompleksan malarmadon kaj justan vivordigon de la tuthomara familio. La alproksimiĝanta ŝanĝo de miljaroj estas la plej konvena epoko por tio.

La komplikita, pasintepoka evoluo de la homaro postlasis ja ege danĝeran heredaĵon: la gordian nodon de la internacia problemaro, kiun eblos – pli bone ol per nova, eksterma milito – distranĉi per la ĝenerala tuthomara pardoniĝo. Ĉar – kiel asertas la franca proverbo: «Ĉion kompreni signifas ĉion pardoni.»

Gravas nur, ke tiu ĉi ĝenerala pardoniĝo ne estu memcela, sed kunigita ĝuste en tiun ĉi triunon, por ke ne povu ripetiĝi la pasintaj eraroj kaj mankoj. Ne plu sopirante pri venĝo, prestiĝo, nek egoisma prospero, ni akiros reciprokan fidon, kapablos difinitive likvidi la pezan ŝarĝon de la tuta homaro – la armadon – kaj per la ŝparitaj rimedoj konstante kontribuadi al kreado de ĉiuflanke digna vivo ĉe ĉiuj ĝiaj anoj – homaranoj.

La prezentita komuna vojo al la tuthomara harmonio – laŭ idearo de Komenio kaj Zamenhof – ŝajnas esti utopia. Sed la kosmaj flugoj – hieraŭ ankaŭ utopiaĵoj – estas hodiaŭ memkompreneblaĵoj. Kial analoge rapide ne povus realiĝi – surtere – la komuna vojo al kompleksa, tuthomara harmonio?

Ĝi estas ja tiel simpla. Ĝiaj tri – reciproke ligitaj – triunuoj havas tute naturajn evolufazojn:

*la unua:* ensemas harmoniigajn semojn en homajn korojn,

*la dua*: zorgas, ke ili elkresku en arbojn de **ĉies** harmonia vivo, plenplenaj de riĉkoloraj floroj,

*la tria*: donas la bezonajn fruktojn al la tuta homaro.

Gravas nur, ke tiun ĉi kompleksan procedon partoprenu spontane **ĉiuj** homoj. Tion akcentadis ĉiam Komenio eĉ Zamenhof kaj tial ili ambaŭ kompiladis ĉiujn siajn verkojn tiamaniere, ke tiujn ĉi povu akcepti **ĉiuj** homoj. Sed kiamaniere praktike atingi ilian ĝeneralan akcepton?

Komenco de ĉio nova estas malfacila, do eĉ efektivigo de tiuj ĉi instigoj. Precipe en la mondo de plenkreskuloj amasiĝas plej diversaj obstakloj: de simpla oportuneco kaj kutimo ĝis diverskaŭze motivata timo de iu nova sistemo. La novaĵoj estas relative pli facile akcepteblaj en la mondo de gejunuloj.

Tial Komenio dediĉis sian atenton precipe al junularo, sciante, ke nur per ĝi eblos atingi la estontan plibonigon de la aferoj tuthomaraj. Sufiĉus nur, ke la tutmondaj lernejoj direktiĝu laŭ lia principo: al **ĉiuj** lernantoj instrui **ĉion** fakte vivbezonan, sed ŝarĝi ilin per **neniuj** konoj superfluaj.

Aplikante tiun ĉi principon, certe eblus ŝpari almenaŭ 1 instruhoron semajne, por envicigi en la instruplanon de la tutmondaj elementaj lernejoj la novan lernobjekton, nomatan moderne: la homekologio, konsistanta el 2 fakoj: la universala lingvo Esperanto kaj la Kosma ekumeno. Ĝi sisteme edukadus gejunulojn, por ke ili povu praktike ekpaŝi la komunan vojon al la kompleksa harmonio.

Komence estus instruata la unua fako lingva, poste – rekte en ĝi, kvazaŭ pliperfektiga kurso – la fako dua, morala. La Kosma ekumeno, popularigata tutmonde per universala lingvo Esperanto, kreus unikan, supernaciecan, tuthomare unuecan etoson. (*daŭrigota*)

# Postmilita E-junularo en Třebíč

*Pavel Sittauer*

La 8-an de majo 1945 finigis aliancanoj en Eŭropo la 2-an mondmiliton. Jam kelkajn tagojn poste en nia urbo denove vigliĝis geskoltoj. Multaj de ili volis kontaktiĝi kun geskoltoj alilandaj. Sed kiel? Dum milito tute ne estis ebleco lerni ian fremdan lingvon. Oni povus, sed nur germanan. Kaj germanoj tiam estis niaj malamikoj!



La plej facila vojo kontaktiĝi do estis Esperanto. Jam en la jaro 1947 kelkaj geskoltoj aliĝis al la 2-a postmilita esperanta kurso, kiun tiam gvidis prof. Kilian. Ankoraŭ dum la kurso tri gekursanoj, nome Olga Hrubešová, Jaris Habeš kaj mi fondis Skoltan Esperanto-Ligon. Kaj tuj la SEL enhavis ĉirkaŭ 30 membrojn. Mi kiel la plej juna fariĝis estro de SEL. Sed, sed, sed!


Venis nova komunista registaro, kiu en la jaro 1950 likvidis skoltismon, kiu laŭ ili devenis de okcidentaj imperiistoj. Nia SEL tuj aliĝis al loka Esperanto-Klubo kaj fariĝis E-Junularo. Tuj al la junularo aliĝis multaj geskoltoj kaj nia E-klubo havis pli ol 200 membrojn!

La grandan grupon ni dividis al malgrandaj trupoj kaj dum programo unufoje semajne oni devis dediĉi 1 horon al instruado de E. Nia programo estis interesa kaj plaĉis al la kultura inspektoro. Pro tio li en la jaro 1952 permesis al ni organizi la 1-an SET-on. Ĝi okazis en la golfo de Vranov-akvobaraĵo Chvalatice. La inspektoro estis, dank' al Dio, esperantisto. Lia kondiĉo estis ĉiutage instrui almenaŭ du horojn Esperanton kaj al ĉiu demando de instruistoj respondi. Jes, ni estas tendaro, sed lingva tendaro!



Kaj kio okazis? Baldaŭ ĉiuj EK en nia lando eksciis pri nia E-tendaro. Kaj multaj interesuloj volas partopreni. Aliĝis tiom da homoj, ke al ni mankis la tendoj. Do kion fari? Ni devis finfine en la jaro 1955 organizi 3 etapojn. Kaj kio pli poste okazis?

Laŭ rezulto de ideologia komisiono de distrikta komunista partio la tutŝtata tendaro ne estis permesita. La funkciuloj de organizantoj estis punitaj. Mi estas la ĉefa organizanto. Sed mi dank' al Dio soldatservos. J. Habeš, mia anstataŭanto, devis por unu jaro labori en uranminejoj en Příbram. Estron de junularo ni elektis s-anon Zdeněk Brož, ĉar li jam estas nur laboristo. Kaj kio okazis?



De laboristo oni lin faris minejisto. En la jaro 1956 la tendaro bedaŭrinde ne okazis. Sed printempe en la 1957-a jaro revenis s. Habeš el mineja brigado! Estis iom malfrue. Sed tamen li tuj komencis la tendaron organizi. Bedaŭrinde nur kun 17 partoprenantoj. Mi forlasis la armeon en oktobro 1957. Ankoraŭ vintre mi kontrolis nian tendaron. Sed bedaŭrinde sur la herbejo de nia loko jam staras du kabanoj. La vintro tiam estis frostega, la akvobaraĵo estis frostiĝinta! Ni do transiris ĝin kaj trovis novan lokon en la golfejo de Lančov.

En Lančov ni do unuafoje tendaris en 1958. Tiam ĝin kun mi organizis s-ano Herman. Li estis ne nur esperantisto, sed ankaŭ komunisto. Dank' al li ni ricevis pli poste monsumon por aĉeti kabanojn. La kabanojn ni mem konstruis. Antaŭ sesdekjariĝo de la tendaro pruntedonis al ni monon estintaj partoprenintoj por konstruado de necesejoj kaj lavejo.



Nun do la tendaro estas vera lernejo de lingvoj. Ni devas diri de lingvoj. Kial? Ĉar en lastaj jaroj aliĝas al E nur malmulte da interesiĝantoj, ni do devis instrui ankaŭ ceterajn lingvojn. En la jaro 2012 ni rememoris la sesdekjariĝon de niaj tendaroj. Dum daŭro de niaj SET-oj vizitis ĝin centoj, eble miloj da partoprenintoj. Sed kie ili estas?

Kiun tendaron de ĉiuj sesdek jaroj mi plej multe ŝatis? Tiun 1-an tutŝtatan en la jaro 1955. La ŝtataj organoj punis nin. Jes, vere! Pri tio mi jam skribis! Sed en tiu ĉi jaro mi trovis tiom da geamikoj! Multaj bedaŭrinde foriris jam labori al sankta Petro. Ekzemple Jarda Maršík, Vuk Echtner, Drahoš Kočvara, Karel Kraft, Dieter Berndt, Karel Franc.

Multaj laboris aŭ ĝis nun laboras en E-movado. Ekzemple Věra Podhradská.



*Fotoj el la SET-kroniko*

# La 4-a IEL Bartošovice

**1. – 4.10.2015**



*foto: WiCo, Hons084*

Karaj amikoj,
ni proponas al vi partopreni la 4-an Internacian Esperanto-Lernejon en la kastelo Bartošovice, situanta 20 km sud-okcidente de Ostrava. Antaŭtagmeze okazas studado en niveloj A, B kaj C. Posttagmeze vi povas ripozi aŭ partopreni aliajn programerojn (koncertoj, prelegoj, ekskursoj ktp.). Loĝado kaj manĝoj estas rekte en la kastelo. Dum vesperoj servas al vizitantoj ankaŭ bela kafejo apud la ĉefa salono de la kastelo.

*Drahí priatelia,*
*dávame Vám na zváženie zúčastniť sa 4. Medzinárodnej školy esperanta na zámku Bartošovice, ktorý sa nachádza 20 km JZ od Ostravy. Doobeda sa uskutočnia kurzy esperanta na urovni A, B, C. Poobede môžete odpočívať alebo sa zúčastniť ďalších programov (koncertov, prednášok, výletov a pod.) Ubytovanie a strava je priamo na zámku. Počas večerov bude otvorená pre návštevníkov aj pekná kaviareň hned vedľa hlavného sálu zámku.*

**PREZOJ:**
tranokto en la kastelo 320,-CZK/persone/nokte, plena pensio (3 manĝoj) 200,-CZK tage, programkotizo (por ĉeĥoj-kat. B) - ĝis 31.7. 500,- CZK, poste 700,- CZK.

Pliajn detalajn informojn kaj aliĝilon vi atingos en la paĝoj:
*Viac informácií a prihlášku najdete tu:*
http://verdastacio.wix.com/lernejo



En https://www.youtube.com/user/11pably/ vi povas sekvi filmetojn pri la antaŭaj aranĝoj k.a. Ligilojn al filmetoj pri IEL kaj elektronikan aliĝilon vi trovos ankaŭ en http://www.esperanto.cz/eo/akce/la-4-a-internacia-esperanta-lernejo-757.html
En la kazo de neklareco skribu ret-poŝte aŭ telefonu rekte al 00420608003593.

*V prípade nejasnosti napíšte mail alebo volajte i priamo na tel.* 00420608003593.

Ĝis revido en nia kastelo
*Dovidenia na zámku*

Organiza teamo de IEL 2015
*Organizačný tím IEL2015*, *Pavol Kaščák*

# Klubaj informoj

**Olomouc:** la 22-an de majo 2015 okazis en Olomouc en klubejo de Patrujscienca Muzeo jarkunveno de la loka Esperanto-klubo, kiun partoprenis 12 klubanoj de Olomouc kaj du klubanoj de Prostějov.




En Olomouc estis instalita Esperanto-ekspozicio, unu panelo dediĉita ankaŭ al Esperanto-klubo Prostějov.




**Prostějov:** Ekde majo kelkaj lernantoj de la elementa lernejo Kollárova renkontiĝas en rondeto de Skolta Esperanto-ligo, kiun gvidas Jaroslav Liška, prezidanto de E-klubo. Infanoj lernas skoltismon kaj Esperanton.

**Přerov:** La 8-an de marto 2015 okazis kluba kunveno en Přerov en la bierfareja restoracio Zubr




**Pardubice**: Membroj de la E-klubo de d-ro Schulhof aktive engaĝiĝis en instalado de la migra ekspozicio *"Ĉu Esperanto estas morta lingvo?"* en Regiona Biblioteko en Pardubice. Pri la aranĝo montris intereson ankaŭ urba radio.



En aprila numero de regiona gazeto *Pardubický Patriot*, disdonata senpage, aperis longa artikolo *Zelená hvězda nad Pardubicemi* (Verda Stelo super Pardubice), en kiu estas priskribita la movado en la urbo. Interese estas, ke la resto de la paĝo estas dediĉita al grava lingvisto Vilém Mathesius, naskiĝinto en Pardubice (1882-1945). Ambaŭ artikolojn preparis redaktorino Klára Jará.

**Písek**: Jan Řepa (surfote meze, konata kiel Fidel) prezentis 22.3.2015 teatraĵon *Karel Havlíček Borovský* de Čestmír Vidman antaŭ la kultura publiko de Písek en la Memormuzeo de Adolf Heyduk. Surfote: Margit Turková transdonas donace la libron *Tři bardové* (Tri bardoj), enhavantan la monodramon, al d-ro Jiří Prášek, direktoro de la Muzeo de la regiono Prácheň, kiu verkis pri la aranĝo, kun apartaj mencioj pri Esperanto, artikolon por la plej legata distrikta semajngazeto *Písecké postřehy*.



**Brno:** La 20-an de majo 2015 prelegis en Brno-Kohoutovice geedzoj Věra kaj Vlastimil Novobilský el Ústí nad Labem pri novaj kompletigaj informoj rilate al la vivo de F. V. Lorenz (1872-1957).




# Migra ekspozicio


*jam gastis en 35 institucioj en 30 urboj en 12 regionoj de Ĉeĥio*



*Inaŭguro de la migra ekspozicio en Regiona Biblioteko en Pardubice (11.3.2015)*



*Inaŭguro de la migra ekspozicio en la ekspreĝejo de S. Venceslao en Pacov (28.4.2015)*



# Max Kašparů en Konsilio de Ĉeĥa Televido

Psikiatro kaj esperantisto Max Kašparů estis elektita kiel membro de Konsilio de Ĉeĥa Televido. Ni gratulas al tiu sukceso, kvankam verŝajne li devos rezigni pri la prezidanteco de IKUE-sekcio, sed li povos helpi al la movado en la nova funkcio pli efike.

# Karel Franc

(1925-2015)



Honora membro de ĈEA Karel Franc forpasis la 18-an de januaro 2015 (sed la asocio eksciis tion nur en aprilo). Li estis gvida persono de la movado en Pardubice, ĈEA-sekretario (1987-1991) kaj estro de ekzamena komisiono. Li apartenis al meritplenaj laborantoj en SET Lančov. En Pardubice li organizis Renkontiĝojn de pacbatalantoj, kun preskaŭ kongresa kvanto da partoprenantoj. Tiom ampleksan aranĝon la tiama reĝino ne permesus alie ol sub la slogano pri batalo por la paco. Ankaŭ lia edzino Mária Francová (1924-2006) laboris por la movado.




Karel Franc kontribuis ankaŭ al faka lingvo en Esperanto per siaj artikoloj pri aviado en AEST-kajeroj: *Ŝparita unuseĝalo – motorigita sportglisilo SF-33, Ĉu negativa sageco de alo estas la solvo? La avio, pri kiu oni parolas: komputerigita sportglisilo „Glasflügel Mosquito B LCD.*“




*Pacrekontiĝo en Pardubice 1983*

# Stanislav Papírník

(1939-2015)




Stanislav Papírník naskiĝis la 7-an de majo 1939 kaj forpasis la 8-an de majo 2015, do unu tagon post sia 76-jariĝo. La infanaĝon dum la milito li travivis en Praha-Suchdol, poste la familio transloĝiĝis al Petrohrad apud Plzeň. La baza soldatservo lin venigis al la slovaka Nitra, kie li edziĝis kaj vivis 12 jarojn. Poste li divorcis, transiris al České Budějovice, kie li denove edziĝis kaj fondis novan familion. Kun sia edzino Irena li konatiĝis en Esperanto-renkontiĝo en Vsetín (19.-22.9.1975), kien li alveturis kun amikoj el Nitra. Post alveno al České Budějovice en 1976 li tuj eklaboris en la loka Esperanto-klubo „La Progreso“. Li kunfondis la samnoman gazeton kaj estis ĝia redaktanto ĝis 1988, post kiu la klubo ĉesigis sian agadon. En la gazeto aperis serio de liaj artikoloj „Invito al České Budějovice“.



Inter la jaroj 1979-1987 li estis membro de la ĈEA-estraro.

La foto estas el Starto 1/1979, kie estis la estraro prezentita.

*Titolpaĝo de la gazeto „La Progreso“, nula numero de 1978.*



# KALENDARO 2015

**2015-07-19/08-01** Somera Esperanto-Tendaro en Lančov Info: info@lancov.cz
**2015-07/24-08/02** Busekskurso de AEH al la 100-a UKo en Lille
Info: aeh@esperanto-aeh.eu
**2015-08-2/14** Somera Esperanto-Tendaro en Lančov Info: info@lancov.cz
**2015-08-14/16** 18-a Renkonto de ekstendaranoj (de SET) en Lančov
Info:esperanto.trebic@volny.cz
**2015-08-17/21** Urba tendaro en Esperanto-Muzeo Svitavy Info:svitavy@esperanto.cz
**2015-09-05** La 9-a Postferia renkontiĝo en Netolice Info: netolice@esperanto.cz
**2015-09-11/13** Renkontiĝo de Katolika Sekcio de ĈEA en Třeboň
Info: m.svacek@seznam.cz
**2015-09-26/27** "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" - inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz
**2015-09-28/30** Vizito de ĉinaj esperantistoj en Svitavy Info:svitavy@esperanto.cz
**2015-10-01/04** La 4-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice
Info: verdastacio@gmail.com
**2015-10-19/25** Aŭtuna Seminario en Skokovy Info:drahotova@eperanto.cz
**2015-11-06/08** Kultura Konferenco (resp. Anstataŭa Kongreso) de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Ústí nad Orlicí
Info: cea@esperanto.cz
**2015-12-05** Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek Info: pisek@esperanto.cz
**2015-12-06** La 8-a Marcipana Kristnasko en Svitavy Info: svitavy@esperanto.cz

## Ni kondolencas

■ La 1-an de marto 2015 mortis **Miroslav Hejduk**, en sia 96-a jaro la plej aĝa klubano en Prostějov. Esperanton li eklernis en 1932 ĉe profesoro Havránek en reallernejo.
■ La 14-an de marto 2015 forpasis **Jarmila Matějková** el Plzeň (95-jara)


## Jubileas

Siajn jubileojn festas jenaj esperantistoj: **Stanislav Štefan**, Kladno, **Blanka Zubová**, Lysá n.L. (pentristino), RNDr. **František Rytíř**, Tábor (prezidanto de Esperanto-rondeto Tábor), **František Frýbert**, Praha (radioamatoro), **Otilie Barešová**, Kolín (instruistino), **Marie Břehová**, Velká Bystřice (tradukantino), **Jana Křížková**, Lanškroun, **Max Kašparů**, Rynárec (psikiatro), **Milena Jelínková**, Jilemnice (nevidanta muzik-instruistino), **Pavel Lehký** el Brno, fondinto de la societo E-lingvo.

## Ni rememoras


19.4.1935 **Jindřich Ondráček**, aktoris en Verda Ĉaro de Julio Baghy, asocia kasisto
10.7.1905 **Vuk Echtner**, laboris por nevidantoj, instruis eĉ komponiston Jaroslav Ježek
28.7.1905 **Vladimír Leraus,** fama aktoro, membro de TRAKT en Verda Stacio Brno
11.5.1875 **František Kavan**, administranto de gazeto *Progreso* en Plzeň
17.6.1915-28.7.1985 **František Mlynář**, aŭtoro de botanika vortaro
5.6.1875 **Stanislav Kostka Neumann**, eminenta poeto, kunfondinta de la Praga Esperanto-klubo

## Ni gratulas



**La 6-an de junio 2015 edziĝis Dan Mrázek, iama prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-junularo.**

**Ni gratulas ankaŭ al alia komitatano de ĈEJ, Dáša Matějů (Chvátalová), al kiu 21.3.2015 naskiĝis filo Jiří.**



# Jiří Patera

1935-2015



La 6-an de junio 2015 forpasis honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, s-ro Jiří Patera. Li naskiĝis la 18-an de aŭgusto 1935.

Unue li laboris en Esperanto-klubo en Most, poste li transloĝiĝis al Prago, kie li multajn jarojn plenumis funkcion de prezidanto. Kelkajn jarojn li estis membro de la asocia komitato, ses jarojn redaktis la organon Starto, poste Bultenon de EK Praha, kiun li dediĉis precipe al literaturo.

En literatura kampo estas liaj plej grandaj meritoj. Li esperantigis rakontojn de Jaroslav Hašek, fabelojn de Božena Němcová, fabelojn de Zdenka Bergrová kaj enĉeĥigis la Zamenhof-straton de Roman Dobrzyński. Li prilaboris historion de la Praga Esperanto-klubo kaj historion kaj memorindaĵojn de la urbo Prago mem. Danke al li aperis esperantlingva resumo en libro pri persona biblioteko de Karel Čapek kaj aperontaj estas ankaŭ personaj bibliotekoj de Jaroslav Heyrovský kaj Mikoláš Aleš. Liaj leteroj ofte aperis en La Gazeto aŭ estis citataj en Pola Radio.

*Miroslav Malovec*

Jaroslav Hašek

# Interparolo kun la malgranda Miĉjo

*Esperantigis Jiří Patera*

Antaŭ pli ol kvar monatoj promesis al Miĉjo liaj gepatroj, ke lia onklo, nome mi, iros kun li promeni. Vole nevole mi devis iri kun li, promesinte al la malfeliĉaj gepatroj, ke la saĝan knabeton mi bonorde alkondukos reen.

Tial mi tuj diris al li, kiam ni eliris el la domo:

"Tenu mian manon, por ke nenio okazu al vi." "Kial nenio okazu al mi?" kun tiu ĉi demando tuj surprizis min la sagaca infano. "Sciu, Miĉjo, oni povus surveturi vin." "Kial oni surveturus ĝuste min, kial ili ne surveturos vin?" "Vi estas ankoraŭ eta." "Kial mi estas eta?" "Ĉar vi estas nur kvarjara." "Kaj kial mi estas nur kvarjara?" "Ĉar vi ne estas kvinjara." "Kaj kio estus, se mi estus kvinjara?" "Tiam vi estus je unu jaro pli aĝa." "Kio estas pli aĝa?" "Vidu, jen tiu fraŭlino estas jam pli aĝa." "Kial vi diras, onklo, jen tiu?" "Ĉar, karuleto, ŝi ne estas tiu, kiu iras kontraŭe." "Kiele, tiu?" "Sciu, Miĉjo, silentu jam bele." "Kial mi silentu bele?"

Mi kapofrapis lin.

La bubo ekploris kaj mi diris al li: "Do ne ploru plu." Li viŝis la okulojn per maniko kaj demandis min senkulpe: "Kial mi ne ploru?" "Ĉar vi estas viro." "Kaj kial mi estas viro?" "Ĉar vi ne estas knabineto." "Kial mi ne estas knabineto?" "Ĉar, kara infano, vi portas pantaloneton, cetere vi ekscios tion, kiam vi estos pli aĝa."

*El la libro Ne nur soldato Švejk*

# Jak platit svazu

### Pozor, změna účtu!
### Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Pozor!
# Změna předplatného časopisů!

**Vzhledem k navýšení cen vydavateli a změně kursu koruny došlo k úpravě předplatného.**

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhraďte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1280,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 720,-Kč
**La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.
**Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Femina:** 870,- Kč (*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4
**Heroldo de Esperanto:** 1330,- Kč (*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3
(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 46. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla**: 15.8.2015

**--------------------------------------------**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio - - 46-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.8.2015

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# Novaj libroj ĉe UEA

**Cent jaroj da soleco, Gabriel García Márquez**, (3a eld). (26.10 EUR).

**Skabio, Sten Johansson**, (17.40 EUR).

**Mensogoj kaj sekretoj de la historio, André Cherpillod**, (12.00 EUR).

**Interlingvo inter lingvoj,** Prilingvaj eseoj. (15.00 EUR)

**Konstitucio de la Regno Japanio, La / Nihon-koku kenpo, (**5.40 EUR)

**Spirita itinero de pastro Dun Karm (1871-1961)** (1.50 EUR)

**De Sicilio al Sicilio / Dalla Sicilia alla Sicilia,** Antologio / Antologia. **Salvatore Di Benedetto**, (18.00 EUR).

**Kial kaj kiel manĝi vegane, Lode van de Velde**, *(*1.80 EUR).

**Malgranda proverbaro kataluna-Esperanto / Petit refranyer català-esperanto, Pedro M. Martín Burutxaga**, (18.00 EUR)

**Korto, La, Kristian Lundberg**, (9.00 EUR)

**Renkontoj dumvoje, Elena Popova**, (11.10 EUR).

**Fundamentaj konceptoj en kemio, S. Kawamura**, (9.00 EUR).

**Ciuleandra, Liviu Rebreanu**, (10.50 EUR).

**Beletra Almanako 22,** (Februaro 2015). (9.90 EUR)

**Krimeo estas nia,** Reveno de la imperio. **Kalle Kniivilä**, (15.00 EUR).

**Esperanto - Kurso: Internacia lingvo - Haitia kreola lingvo,** Kou: (10.50 EUR)

**Fundamento de Esperanto,** O Fundamento do Esperanto. **L.L. Zamenhof**, (14.70 EUR).

**Jarkolekto "Esperanto" 2014, (**36.90 EUR)

**Fajra amo, Aitor Arana**, (9.00 EUR)

**Testamente,** Plena originala poemaro. **Edwin de Kock**, (36.00 EUR).



Prelego de geedzoj Novobilský en Brno la 20-an de majo 2015 pri F. V. Lorenz



Polaj infanoj vizite en la urbo Litomyšl




Kluba kunveno de EK Přerov en marto 2015



Renkontiĝo en Moravská Třebová



Kluba jarkunveno en Písek



Klubo E-mental' vizite ĉe esperantistoj en Nurenbergo (18.4.2015)